# Aŭstraliaj Esperantistoj


## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KAJ NOVZELANDO**

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

**PLENUMITA 22/10/2015 Ducentkvardeka eldono 22/10/2015 SENDITA (unua eldono 20/09/2011)**

**Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**SENDATA AL 315** La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj


## El Ĉinujo 中国武汉 **Roĝer vizitas Ĉinujon ĝis 29-Novembro -2015**

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Sendu respondojn novaĵon (eĉ mallongan), bildojn, fotojn al mi rspring@tpg.com.au

**Ĉiuj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ atingeblas je la suba adreso**


http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

★Se troviĝas gramatikaj eraroj en « Aŭstraliaj Esperantistoj » sendita al vi, haveblas en la reto por la interesuloj kopio korektita .

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Estas pli ol 166,000 lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo.
https://www.duolingo.com/ (la Esperanto-kurso de Duolingo el de la 28a de Majo 2015)

# 93. LA GRAMATIKO DE ESPERANTO



## Prepozicio aŭ Akuzativo? Ĉ.

Jen la du pliaj kazoj, kie ni povas uzi la akuzativon anstataŭ prepozicion:

3a kazo. Se normale la esprimo komprenatas en la signifo de nur unu prepozicio. Ekz. ĉe “Mi pensas la venkon” oni komprenas nur “Mi pensas pri la venko”, neniam “sub” aŭ “sur” aŭ “post la venko”.

4a kazo. Se ĉeestas du prepozicioj kune, sed nur se la unua estas “al”, oni povas anstataŭigi “al” per la akuzativo, do neniam ĉe ekz. ”Ni restis hejme ĝis post la pluvo”. Jen ekzemploj: “Ni veturis al trans la rivero” --à “Ni veturis trans la riveron”, (kiu frazo havas malsaman signifon ol “Ni veturis trans la rivero”, kio signifas nur je la alia flanko de la rivero”.

Venontnumere: “Postskribo”. Marcel Leereveld.



## Novaĵoj pri la Esperanto-Doma Gastdormejo

La **GASTDORMEJO** devas antaŭmendati de estontaj Esperantistaj gastoj.

Sendu ĉiujn petojn por resti en la gastdormejo al la Sekretario de la Esperanto Federacio de NSW retmesaĝe al efnsw@tpg.com.au Dankon!

Kam Lee kaj May O’Halloran venos la 29an de Oktobro ĝis la 4a de Novembro.

Tomiko Otagiri kaj ŝia frato. Ili deziras restadi de la 21a ĝis la 25a de Novembro

Lyudmila (KELLOWAY) alvenos la 09-an kaj foriros la 15-an de Decembro 2015.



## Esperanto Kafo-Klubo de Kanbero

Anoj kunvenas ĵaŭde en la Pancake Parlour, 122 Alinga St., (Melbourne Building).Kanbero

Via inform-letero diris ke la Esperanto Kafo-Klubo de Kanbero kunvenas vendrede. Tio estas malprava, ni kunsidas ĵaŭde en la Pancake Parlour, 122 Alinga St., (Melbourne Building). Kanbero

Mi pardonpetas pro la ne-informado. Mi nur konstatis ke estas eraro kiam mi ricevis mesaĝon de esperantisto kiu volas ĉe-esti, do la sistemo funkcias malgraŭ la eraroj.

Nia klubo daŭras. Apenaŭ, estas ses partoprenantoj; tri kiujn oni povas nomi parttempajn partoprenantojn. Eble nun estas sep.



Bondezirojn al ĉiuj, Huigh (Hjui)

## Se vi ne informas min, AE ne povas informi niajn 315 ricevantojn.

Sendu novaĵon eĉ mallongan, bildojn, fotojn al mi eĉ dum mia foresto en Ĉinujo

Saluton,


Mia nomo estas Yamilé. Mi eklernis E-on en Septembro kaj mi deziras korespondi kun

vi. Mi ne parolas bone. Mi tre bone parolas la anglan.

Ne forgesu transdoni miajn salutojn al ĉiuj niaj amikinoj.

Yamile Suarez <seguridad@dsa.minag.cu>: sendita per Katja

# Mi juĝas la jenajn la plej elstaraj karakteraĵoj de Esperanto:



1e. Ĝiaj sonoj estas klaraj kaj distingeblaj.

2e. Ĝia literumado estas regula kaj fidinda.

3e. Ĝiaj gramatikaj reguloj estas simplaj, logikaj, sufiĉaj, kaj sen esceptoj (kie tio lingve eblas).

4e. Ĝia havas tre riĉan vortpluformadon pro sia aglutineco.

5e. Ĉiu radiko havas nur unu signifon, kun krome ebla figura senco.

6e. Ĉiu signifo havas sian solan propran esprimon, kaj se eble en nur unu vorto.

7a. Ne ekzistas duoblaj samaj konsonantoj, kio plifidindigas la komprenon.

8a. Ne ekzistas unuliteraj vortoj, nur unuliteraj sep finaĵoj.

9a. Ĉiu prepozicio havas nur unu signifon kaj prepozicia'joj riĉe formeblas kaj formatas.

0a. La elementoj de la lingvo ne estas tro longaj nek tro mallongaj.

Marcel Leereveld.




Malsanulejo kutime uzata anstataŭ privataj kuracistoj



Malgranda malnova strato. Plene uzataj

La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Se vi trovis eraron, aŭ mankon, informu AE rogerspringer@tpg.com.au

# "Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

http://youtu.be/A6Qg88fpDY8 38 minutojn da Bona Esperanto, Bonaj Konsiloj



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.

http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine

Vi bezonas nur 5 minutojn ĉiun tagon por tiu programo. ☺★★★

**Metu la adreson en viajn preferatajn programojn kaj ĉiutage Klaku, Aŭskultu,Spertiĝu**

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Por pli longdaŭraj, bonaj aŭskultadoj elektu sube:-

**http://esperanto-radio.com/3zzzradio (Radio Melburno)**

http://esperanto.cri.cn/radio/info.htm



http://pola-retradio.org

http://muzaiko.info

http://www.radio-vatikana-esperanto.org

http://www.ameriko.org/radiokubo

http://www.budhano.cn/podkasto .

http://www.podkasto.net

http://www.ameriko.org/eo/radioaktiva

Ne eblas lerni naĝadon sen mergiĝi en akvon. Ne eblas lerni lingvon sen mergiĝi en tiun lingvon. Aŭskultu Esperantan radion per la reto. aŭ pli?

★

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# La Kluboj

**Se la suba kluba informo estas neĝusta informu min. Roger.** rspring@tpg.com.au

★★★**La Manlia Esperanto-Klubo.** Roger Springer 02 9976 0632

★★★**La Brisbana Esperanto-Societo.** Kay Anderson 07 3372 7006

★★★**Esperanto-Grupo de Centra Marbordo.** Jo Turvey 02 4362 8287

★★★**La Tasmania Esperanto- Societo.** Kam Lee 03 6225 1474

★★★**La Melburna Esperanto-Klubo.** Heather Heldzingen 03 9525 4295

★★★**Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero.** Huigh Malcolm 02 6288 4334

★★★**Esperanto-Domo, Sidnejo.** Roger Springer 02 9976 0632

★★★**Esperanto en Sudaŭstralio.** Bob Felby 08 8242 1460

★★★ **Adelajda Esperejo,** Max Wearing 08 8359 3375

★★★**Esperanto League of Western Australia Inc.** ,Vera payne 08 9387 1520

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# La Novaĵletero de Aŭstraliaj Esperantistoj

Pasintaj numeroj de 'Aŭstraliaj Esperantistoj'

Sur la **retpaĝo de AEA** http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

La ‚Aŭstraliaj Esperantistoj' (AE) publikigas vidpunktojn en Esperanto, sendepende ĉu vi estas membro de kluboj aŭ asocioj.

Skribu al ĉirkaŭ 315 individuaj legantoj, sed en Esperanto, mi petas.

La Novaĵletero Aŭstraliaj Esperantistoj estas elsendata almenaŭ unufoje semajne.

La novaĵletero 'Aŭstraliaj Esperantistoj' subtenas liberan sinesprimon kaj honestajn kaj senkaŝajn artikolojn. Sed ni rezervas la rajton modifi aŭ forigi viajn komentojn se ni konsideras ilin ofendaj aŭ tro malrespektaj. Ni nun provlegas ankaŭ la leterojn kaj korektas la mistajpaĵojn kaj gramatikajn erarojn.

Se oni prokrastas ĝis perfekteco, oni faras nenion, ĉar la morto atendas nin.

Ne Ĉagreniĝu! sed Parolu!, Skribu!,

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Interesaj faktoj por Propagando

La mezursistemo havas ekde 1795 logikan facilan metran sistemon.

Lingvoj havas logikan facilan Esperanton ekde 1887.

Ĉu lernanto preferus lerni la metran sistemon aŭ la britan sistemon?

Muziko havas bekflutojn (school recorders) por instigi studentojn lerni pri muziko.

Lingvoj havas Esperanton por instigi studentojn lerni pri lingvoj.

Esperanto estas la 27a lingvo en la listo de lingvoj laŭ nombro de artikoloj en Vikipedio (entute 285 lingvoj estas uzataj tie).

En Hungarujo Esperanto estas elektebla lingvo kiel antaŭfako por universitataj studoj. Miloj da gestudentoj ĉiujare lernas Esperanton.

Eĉ la fuŝa studo de la angla plifaciligas la estontan studon de Esperanto en ne latin-alfabetaj landoj.

# Interesaj artikoloj en pasintaj Novaĵleteroj

http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

La historio de la originala Ŝlosilo ĉe paĝo 7 AE191

“Discover Esperanto”.Estas angla traduko de la Esperanto-libreto “Malkovru Esperanton”,

# Iloj por Esperantistoj

Esperanto-Flago por tabloj ĉe kunvenoj. Vidu AE158. Bona propagandilo.
http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Senpaga Freelang vortaro estas tre uzinda kiam vi skribas, legas per komputilo

Plena Ilustrita Vortaro (PIV) estas surrete. http://vortaro.net/

Kiam, Kie, Kio okazas Esperanto-renkontiĝoj en 2014 kaj Poste. En la mondo

# Iloj por Esperantistoj

Esperanto-Flago por tabloj ĉe kunvenoj. Vidu AE158. Bona propagandilo.
http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Senpaga Freelang vortaro estas tre uzinda kiam vi skribas, legas per komputilo

Plena Ilustrita Vortaro (PIV) estas surrete. http://vortaro.net/

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Uzu Esperantajn literojn Ĉ, Ĝ, Ĵ, Ĥ, Ŝ kaj Ŭ

Unu el la pli facilaj metodoj **http://esperanto.typeit.org/ senpage aŭ**

**http://www.typeit.org/app/?lang=esperanto&side $12.50c**

La specialaj Esperanto literoj estas ĉiuj en la ''Latin 3 Symbols'' supre dekstre sub ''Insert''. Oni alklakas ''Insert'' kaj dekstre aperas ''Symbols''. Oni povas instali la Esperanto literojn sur la klavaron. **aŭ**

**Por vindozaj komputiloj senpagaj Ek!** aŭ Tajpi aŭ vidu sube

Angle http://en.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters,

Esperante : http://eo.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters

iPhone Nun estas havebla pli bona Esperanto-klavaro por iPhone/iPad kun iOS8. Oni povas facile ŝanĝi inter la kutima klavaro kaj la Esperanto-klavaro, kaj tajpi rekte en iu ajn programeto: https://itunes.apple.com/au/app/id951119795

La epoŝta programo "gmail" de Google transsendas la esperantajn literojn tute bone.

## Uzi Esperantajn literojn por Mac OS X

http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo Vidu AE191

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Lecionoj, Studoj, Legado, Muziko

Nun vi povas lerni ankaŭ Esperanton per **lingibli.** http://eo.lingibli.com/

**Duolingo.** Unu el la plej utilaj atingoj por Esperanto estas ke ĝi lerneblos per la ege ŝatata retejo Duolingo.. https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online

Kurso de **Esperanto** - Main page http://www.kurso.com.br/index.php?en

**lernu**! - Learn **Esperanto** online. Live tutorsx, dictionary, books & music **lernu**.*net/*

Esperanto-kurso "uTalk" La ligo por la elŝuto: http://utalk.com/app. **By EuroTalk**

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Rekomendata Legado, Videoj

“Mirmekobo,” de Donald Broadribb www.gazetejo.org/eo/mirmekobo

“Tamen Plu” de Katarina Taggart. Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj

“Telopeo” de EFNSK Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj

“Esperanto sub la Suda Kruco” AEA www.esperanto.org.au info@esperanto.org.au

Via kluba Novaĵletero? Laŭ peto, ni sendos retkopion al niaj konataj retadresoj

EsperantoTV http://www.esperantotv.net/

http://ckuik.com/Esperanto Eniro je Multegaj Esperantaj videoj de Jutubo

Filmetoj de Gian Piero Savio **http://vimeo.com/album/2111699**

http://www.bookbox.com/ La rakontoj estas voĉlegataj de diversaj personoj

The Simpsons https://www.youtube.com/watch?v=M_77-WMZ1nY

**LA ESPERO** Esperanta himno Bonega por Zamenhofaj Festivalaj kunvenoj

Esperanta kunkanto (Karaoke) kun A-cappella Ĥoruso

## **Gastdormejo** de EFNSK

La ĉefa rolo de la Gastdormejo estas helpi la anojn de EFNSK ĉeesti EFNSKajn kunvenojn. per eventuala dumnokta dormloko ĉe ED post aŭ antaŭ la kunvenoj.

La **GASTDORMEJO** de EFNSK devas esti antaŭmendita de estontaj Esperantistaj gastoj.

Neniuj Esperantistoj loĝas tie aŭ proksime por helpi gastojn. Se eble antaŭmendu almenaŭ 2 semajnojn antaŭe. Tio helpas nin prepari la gastdormejon.

La Sekretario de la EFNSK prizorgas la gastdormejajn mendojn.`

Petu lin pri ebleco gastiĝi. efnsw@tpg.com.au

# La Ricevantoj de "Aŭstraliaj Esperantistoj"

La nomlisto de “Aŭstraliaj Esperantistoj” enhavas homojn kun konataj nomo kaj retadreso. Individuaj ricevantoj de Esperanto-elsendaĵoj per la reto kaj listigitaj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.

Se vi deziras ke via nomo estu sur tiu listo de ricevantoj, abonu! rspring@tpg.com.au

Se vi deziras ke via nomo ne estu sur tiu listo de ricevantoj, malabonu! rspring@tpg.com.au

Se vi deziras ke nomo de familiano estu sur tiu listo de ricevantoj, informu min.

Mi povas krome plusendi mesaĝon al individuo, kiu estas en la supra listo.

Mi ne donas adresojn al petantoj.

Viaj leteroj al AE, devas montri vian nomon kaj se vi deziras, retadreson se vi akceptas, ke ĝi estu montrata post via letero.

Mi ne aldonas iun ajn retadreson se la skribanto ne mem faras tion.

Ĉu vi ŝanĝos vian retadreson? Informu min. rogerspringer@tpg.com.au;

La adresaro de "Aŭstraliaj Esperantistoj" estas uzata por sendi aliajn gravajn informojn.

***Novaĵservo RET-INFO / Lingvo-Studio***



**DUOLINGO-KURSO POR HISPAN-PAROLANTOJ EKPREPARATA**

Ĵus komenciĝis ĉe Duolingo la preparado de "Esperanto for Spanish speakers" - https://incubator.duolingo.com, en Incubation

**Phase 1.** La preparado de la versio por anglalingvanoj daŭris proks. dek monatojn - supozeble ĉi-foje pretiĝos pli rapide... :)

Intertempe estas registritaj 165.000 Esperanto-lernantoj en la angla lingvo ĉe duolingo.com; proks. 1100 novaj lernantoj tage. Vidu ĉe Incubation

**Phase 2. Listo de pliaj retaj Esperanto-kursoj ĉe: http://tinyurl.com/lingvolerniloj**

Tie troveblas ankaŭ retaj vortaroj, aŭtomataj tradukiloj, lingvoludoj, kartaroj por vortolernado, perado de instruistoj kaj konversaciaj partneroj ktp.

Konstateblas, ke 90 % de la retaj senkostaj lingvopaĝoj kun almenaŭ 25 lingvoj havas nun ofertojn ankaŭ en Esperanto. Kial? Nu, eble tiu ĉi prelego helpos klarigi la kaŭzon: http://www.esperantoland.org/dosieroj/LaLongaVosto.pdf

Lu Wunsch-Rolshoven